# N I A   V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde vespere
aliaj tagoj aŭtomata respondilo

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz

JUNIO 1996


## ESPERANTO ĴURNALE

José Matos de Castro, membro de MEL, aperis en la ĵurnalo "Ideal" de Granado, kune kun Enrique Carrasco (1996-04-21) en tutpaga artikolo pri esperanto. Bedaŭrinde ne aperas adreson aŭ telefonnumeron.
"La Vanguardia" (1996-04-08) publikigas artikolon laŭ titolo "Hablemos de idiomas" en kiu diras ke esperanto estas la plej inteligenta artefarita lingvo.

## HISPANA-ESPERANTA VORTARO (A.Casquero)

La 27-a de julio, okazis en de El Puig (Valencia), kunveno de esperantistoj por pritakti la aferon de la nepre necesa eldonado de esperanta poŝvortaro. Estis prezentitaj diversaj ideoj kaj projektoj, inter kiuj la plej interesaj estis tiu de Luis Ojer, pacience prilaborita dum kelkaj jaroj, kaj tiun de Miguel G. Adúriz, kiu proponis profiti la gigantan laboron farita de F. de Diego, kiu verkis vortaron Hispan-esperantan, kun 50.000 voĉoj, el kiuj oni farus malgrandigon por krei vortareton. Post longa diskuto, kaj nova kunveno en Valencia Esperanto-Grupo, estis decidite apogi ĉi lastan proponon, kaj mendi tuj la laboron al Adúriz, kiu promesis havi la vortaron preta por la fino de la nuna jaro, 1996.
**Restas paroli pri detaloj (grandeco de la vortaro, aspekto, prezo, nombro da paĝoj, eldonrajtoj, ktp.)** Valencia Esperanto Grupo mendos minimume 100 ekzempleroj, S-ro Conejero, el Castellón mendos je valoro de 100.000 pesetoj, ankaŭ Fondaĵo Soler kaj MEL mendos ekzemplerojn, kaj supozeble ankaŭ libroservo de HEF. Ĉiuj aliaj interesitoj, bonvolu kontakti tuj al Grupo Esperanto de Valencia, HEF aŭ M.G. Adúriz por konvena kunordigado de la eldonkvanto.

Ni resumas informojn ricevitajn ĉe MEL rilate stokon kaj necesojn pri "Sopena", de diversaj grupoj (Ni pensas ke tiuj datumoj estos utila por antaŭ-plani eldon-kvanton)

| GRUPO | STOKO | NECESOJ/JARE |
|---|---|---|
| AEU | por kelkaj jaroj | ??? |
| Madrida E-Liceo | 37 | 20 |
| Libroservo-HEF | 0 | ??? |
| KAE. Terrassa | ??? | 2 |
| KAE Sabadell | ??? | ??? |
| Antauen | 3 | ??? |
| Grupo Bilbao | ??? | ??? |

## *HEF ANGULO*

Ĉe HEF-CO petis helpon por traduki esperantajn tekstojn, respondeculo de musik-eldonejo (Disko "Nirvana" El Bosco). Li deziras meti esperantajn rekantaĵon en angla kancono. Li elektis diversajn frazojn de UNESCO declaracio pri homaj rejtoj.
HEF-CO sendis cirkuleron kiu enhavas, inter aliaj, jenajn informojn: Novaj HEFanoj: 1994 (11), 1995 (12) kaj 1996 (16). **Nuna HEFanaro: 472** (inter ili 28 E-grupoj, kolektivaj membroj).

UNUAFOJAJ KONTAKTINTOJ AL KEF-CO

| Jaro | N.K. | Peranto | Poŝto | Telef. | Vizito | Fakso | Komputilo | Totalo |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1988 | | | | 1 | | | | 1 |
| 1989 | 5 | | | 1 | | | | 6 |
| 1990 | 1 | 2 | 4 | | 1 | | | 8 |
| 1991 | 4 | 5 | 7 | 36 | 4 | | | 56 |
| 1992 | 5 | 6 | 9 | 25 | 8 | | | 53 |
| 1993 | 1 | 2 | 38 | 34 | 9 | 3 | | 87 |
| 1994 | 1 | 10 | 15 | 27 | 2 | 1 | | 56 |
| 1995 | 1 | 54 | 16 | 26 | 6 | 3 | 1 | 107 |
| 1996 | | 2 | 12 | 30 | 3 | 1 | | 48 |

Ankaŭ sendis liston de la nuna junularo de HEF (26 personoj) kaj propaganda flugfolio por unuafojaj kontaktuloj, farita surbaze de internacia modelo proponita de TEJO.

## HISPANIO

**Valencio** La Facultato pri Filologio aprobis la estiĝon de Instituto pri Modernaj Lingvoj, inter kiuj troviĝos esperanto. Tiu informo estis komunikita dum la fermo de la kurso okazinta en tiu-ĉi Universitato, kun grandega sukceso (20 oficialaj lernantoj kaj 5 aŭskultantoj).

Denove la kanta-aŭtoro Eduardo Vargas uzis esperanton en koncerto okazinta en **Malago**, en tiu okazo nia kara "Solo" elektis la seudonimo "Astra"

## ESPERANTO EN INTERNET

La sveda revuo "Espero" povas konsulti en jena adreso: http://www.esperanto.se/espero.html
En la www-paĝo de Vatikano (http:// www.vatican.va), "Espero Katolika" anoncis kaj enlistigis en esperanto, inter 54 lingvoj, salut-nov-jarajn vortojn de la Papo.

## NOVA LITERATURA PREMIO

Dum la Valencia-Murcia kongreso, oni informis pri la projekto de vin-entrepreno de Cheste (Valencia) krei novan literaturan premion en Esperanto. La premiota aŭtoro ricevos du mil dolaroj, unu el la plej riĉe pagata en nia movado. La entrepreno kaj lokaj esperantistoj preparas bazojn de la konkurso kiu temos pri vino.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

La 11-an de Majo, dek geesperantistoj kaj gesimpatianoj de Madrido, akompanataj de geedzoj Diminikov, el Ruslando, vizitis kelkajn misteranj lokojn de la provinco de Toledo,: preĝejo Sankta Maria de Melque (Melke) kaj kastelo de Montalbán. Bedaŭrinde la vetero estis malbona, sed niaj fieraj samideanoj ne timis pluvegon kaj promenadis tra la malseka kamparo. Poste kune manĝis en simpatia etoso. La lokoj estis tiel belaĵ ke ĉiuj decidis reiri dum autuno.

Ĉiu-lunde ni kunvenos, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

**Prelegoj** dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.
10a de junio "Madrido ekde la ĉielo" L. Sanz
**Kursoj**: Ĉiuj ferios ĝis Septembro/Oktobro
**Ekskursoj: 22-an junio (sabato) FOLKLORA FESTO EN UTANDE (Guadalajara)**

# Koresponda kurso: AEU. Apdo 864. 29080 Málaga

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

55a Hispana Esperanto Kongreso. 12-17a julio. Murcio
81a Universala Kongreso de Esperanto. 21-28 julio Prago (Ĉekio)
4-a Internacia Kultura kaj Turisma Esperanto-semajno. 5-12a oktobro. Calella (Barcelona)

**VALENCIA ESPERANTO-GRUPO ORGANIZAS DU KARAVANOJN AL PRAGO,**
**⋆ 1.- aŭtobuso al Poprad kaj Praga, du semajnoj por 72.000 ESP**
**⋆ 2.- aviadilo + loĝado al Praga, 72.000 ESP**
**Petu informojn (96) 384 96 16**

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Atocha 98-4°
28012 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal